

Johann Wolfgang von Goethe, Roz' sur erikejo	Johann Wolfgang von Goethe, Dornrozeto	Johann Wolfgang von Goethe, Rozeto en herbejo	Johann Wolfgang von Goethe, La rozeto
<i>tradukita de Konrad Matheus</i>	<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	<i>tradukita de Gotthilf Sellin</i>	<i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i>
Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al juna ŝos' admiru ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Vidis knab': Jen, juna flor'! Rozujet' kampara! Bela, kiel la aŭror'! Li alkuris ĝoje por Vidi, kiel kara! Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Knab' rozeton vidis li, Vidis en herbejo; Estis juna, bela ĝi, Por ĝin vidi kuris li, Vidis kun ĝojego. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Knabo vidis – jen rozeto Sur la kampo staras; Bela, juna la floreto . . . Vive kuras la knabeto, Ĝojas, miras, flaras. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.
Diris knab': "Mi rompos vin, rozo sur erikejo." Diris roz': "Dorn' pikos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Diris knab': Mi volas vin, Rozujet' kampara. Diris roz': Mi boras vin, Ĉiam vi memoras min, Pro l' dolor' amara. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Diris knab': mi rompos vin, Rozon en herbejo, Diris roz': mi pikos vin, Ĉiam vi memoros min, Mi ne ĝin permesos. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Knabo diris : « mi el-tiros Belulinon mian »; Floro diris : « vi foriros, – Per pikiloj mi disŝiros Tuj la manon vian ». Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.
Kaj knab' sovaĝa rompis ĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Knabo rozon ŝiris do De l' rozuj' kampara, Ĝi, defende, pikis tro! Sed ne helpis ve kaj ho Kontraŭ vol' barbara. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Knab' sovaĝa rompis ĝin, Rozon en herbejo; Kvankam roz' defendis sin, En koler' ĝi pikis lin, Tamen morti devis. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	La sovaĝa knab' ridante La rozeton prenis, – La floreto batalante Sin defendis pikadante, Sed la sorto venis. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'.
...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976).

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (\*1844-05-18 - †1921-10-09).

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en [http://kantaro.ikso.net/rozeto\\_en\\_herbejo](http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo). Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf\\_Sellin](http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin).

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.